

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Novajoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

Ĉio suba okazos en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa
(= Centro por la gubernianoj de Kanagawa),
ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

★ KURSOJ

Unu-tagaj kurso - apr. 18, 15h00-17h00, 300 enoj.

Rudimenta kurso - de apr. 25 ĝis jul. 18, 15h00-17h00, 6000 enoj.

★ HAMA-RONDAJ VESPEROJ

Aprile: pri Montevideo 60

*apr. 18, 17h00-19h00

Maje: pri Ĝemelaj urboj kaj ties rondo

*majo 16, 17h00-19h00

Junie: pri la ĵus fondita (espereble!) Ne-
Profitcela Organizo Esperanto Jokohama

*junio 20, 17h00-19h00

TIEL OKAZIS

EKSPOZICIO ĉe Foiro de Civitanaj Agadoj

*mar. 7 kaj 8, 10:00-16:00

En la teretaĝo de la kutima kunvenejo okazis Foiro de Civitanaj Agadoj, en kiu budoj de diversaj rondoj montris sian agadon. Ankaŭ ni uzis unu tablon kaj muron, tiom larĝan kiom unu tablo, por ekspozicii pri Esperanto.

Cetere, en sept. 5 kaj 6, ni intencas uzi la tutan spacon por nia propra ekspozicio.

HAMA-RONDA VESPERO pri franca vivo

*mar. 21, 17:00-18:30

Nia gasto estis s-ino AUDIBERT Kazue, loĝanta en suburbo de Parizo. Ĉeestis 14 rondanoj, kaj aŭskultis ŝian parolon pri franca vivo. Ŝi portempe loĝas ĉe sia patrino en Japanio.



Niaj Klasoj kaj Kursoj

*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; oni lernas per “Mirindaj Aventuroj de Metilernanto Hlapiĉ” ĝis aprilo / (2) Klaso por legado de “Hispana, Kataluna, Mangada...” / (3) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: “Vizaĝoj”.

*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni legas “Rakontoj sub la lito” de Antoaneta Klobučar. / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de “Hanako lernas Esperanton”.

- Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

98a Legokunsido

En la 14a de marto, ni havis la 98an Legokunsidon, kaj ses personoj venis por rakonti la impreson de “Lumo kaj Ombro”, unu el la verkaroj de Vasilij Eroŝenko.

Lumo kaj Ombro

Mizro Iwaya

Vasilij Eroŝenko estas mirinda figuro en Esperantujo. Li vojaĝis multe tra la mondo, kaj verkis multe en diversaj lingvoj. Se temas pri Esperanto, liaj verkoj posedas naivan simplecon kaj akran kritikon samtempe. Tio devenas de lia profunda observo al la homa socio. Oni kutime diras ke blinduloj havas handikapon en sentado de socia fenomeno. Sed ofte okazas male. La blindeco donas avantaĝon: ili povas pli profunde kaj senĝene vidi kaj pensi pri la socio.

Antaŭ ĉio mi volas diri, ke lia unua sperto en la socio donis al li liberan observon kaj kritikemon. Tion rakontas “Unu paĝeto en mia lerneja vivo”. Tiu historio, en Imperia Rusio, estis miriga. Oni kutimas starigi sian oportunon antaŭ ĉio. Tia tendenco pli klariĝas kiam oni ricevas nenian kritikon el la ekstero. Ĝuste tia estis la stato de la blindula lernejo kiun la aŭtoro ĉeestis en sia juneco. La instruistoj ne instruis, sed nur obeigis la lernantojn. La rezulto estis ... nur dubo al la aŭtoritato.

Plej kortuŝa estis “Rakontoj de velkinta folio”. En ĉina socio post la unua mondomilito abundis tragedia vivo de popolanoj. Eroŝenko ĉerpis ilin el la ĉiutaga vivo kaj simbole rakontas en fabela stilo. Tia priskribo pli klarigas la mizeran staton de la popolo. La aŭtoro deziras helpi ilin, sed ne povas. Tial li devis preni la figuron de malnova arbo, kiu staradas kaj vidadas en la urbo sed faras nenion.

Infanoj havas nenian antaŭjuĝon al la socio. Ili simple sentas kaj pensas naive. Tia estis Eroŝenko dum la tuta vivo. Mi lastatempe legis “La eta princo” de Saint-Exupéry. Tiam la epilogo diris ke la aŭtoro tenis knabecan koron dum la tuta vivo. Ja devas esti. Do ankaŭ Eroŝenko estis tia kaj verkis multon en sia knabeca koro. Tial liaj verkoj kortuŝas nin.

“Lumo kaj Ombro” de Vasilij Eroŝenko

Sibayama Zyun’iti

Vasilij Eroŝenko lernis Esperanton junaĝe en Rusio, venis en Japanujon en la aĝo de 24, kaj aktivis multe en Japanujo utiligante Esperanton – sed tiam li ne verkis, almenaŭ publike, en Esperanto. Li verkis fabelojn en la japana. Li ekverkis en Esperanto, nur kiam li estis ekzilita el Japanujo kaj alvenis en Ĉinujo en la aĝo de 31. Kaj tiu ĉi verkaro estas kolekto de tiaj verkoj, nome liaj virgaj Esperantaĵoj.

La unua rakonto, “Unu paĝeto en mia lerneja vivo” priskribas tagojn de Eroŝenko en rusa blindula lernejo. Kaj eĉ se la priskribo estas fikcia, li jam de tie montras spitemon kun sarkasma tono, al la reganta aŭtoritateco, unu el la karakterizaĵoj de liaj verkoj. Tion ni povis iom senti eĉ de lia frua japanlingva verko pri la vivo en Rusujo, nome “Paskotago” (Legu en la marta kaj aprila n-roj de La Revuo Orienta, 2015). En ĝi, li priskribis pri malriĉa maljunulino, kiu ĉiam “rakontis pri la feliĉo de la reĝaj familianoj” kaj li en knabeco, “miris, kial ŝi scipovas pri tiaj pompaj aferoj” kaj “eĉ nun mi miras je tio.”

Nu, tia socia malekvilibro, inter la havantoj kaj ne-havantoj, estis ĉie, en Rusujo kaj Japanujo, sed kredeble tion Eroŝenko pli forte sentis en Ĉinujo, kie li vivis. Tion li verkis, malĝojtone, ne sarkasme, en “Rakontoj de Velkinta Folio”.

Li verkis multajn “fablojn” en la japana kaj Esperante. Mi pensas, ke troviĝas relative multaj, en kiuj troviĝas du ĉefaj protagonistoj, kaj neniuj el ili fariĝas feliĉa. “Turo por fali” en tiu ĉi libro estas tia. Du malsanaj knaboj en la japanlingva fabelo “Du malgrandaj mortoj” (lastatempe esperanten tradukitaj kaj aperis en la lastajara *Novaĵoj Tamtamas*) estas tiaj. Eroŝenko do estis spirite spitanto al la reala mondo, sed verkis relative pri malvenkintoj en la reala aŭ fikcia mondo, mi pensas.

ESEJOJ

Boj, boj! Miaŭ, miaŭ!

Forlasitaj bestoj post la Granda Tertremo en la Nord-Orienta Parto de Japanio

Doi Ĉieko

Jam pasis 4 jaroj post la Granda Tertremo en Nord-Orienta Parto de Japanio, okazinta en la 11a de marto 2011. Mi pensas, ke ne malmultaj homoj en la mondo scias pri la tertremo. Tamen mi priskribu ĉi tie nur simple: ĝia momenta magnitudo estis 9.0, kaj sismocentro estis tre tre vasta (sude-norde 500 km, kaj oriente-okcidente 200 km). Damaĝoj do okazis vaste, ne nur en la distrikto Toohoku sed ankaŭ en Tokio kaj eĉ en nia urbo Jokohamo. La nombro de mortintoj kaj perdiĝintoj estas 18,483 laŭ la statistiko en januaro 2015. Estas ankoraŭ pli ol 2,500 homoj ne trovitaj. Tuj post la tertremo rifuĝintoj estis pli ol 400,000, kaj ĉi-jare ankoraŭ pli ol 230,000 da homoj vivas en provizoraj domoj. 90 % da mortintoj kaj perdiĝintoj perdis la vivon pro cunamoj, kaj pli ol 60% da mortintoj estis pli ol 60-jarojn aĝaj. Ankoraŭ multaj jaroj necesos, ĝis homoj en la damaĝitaj lokoj rehavos sian trankvilan vivon.

Nun mi volas prezenti ne homojn sed bestojn en la damaĝitaj lokoj, precipe en lokoj proksime de la Atomcentraloj de Fukuŝima.

Estas grupo *Societo savi hundojn kaj katojn forlasitajn en la damaĝitaj lokoj en Fukuŝima*, karesnome *Boj-Miaŭ-Farmo Jokohama*. La grupo estis fondita en septembro 2012, sed antaŭ tio jam komenciĝis helpado al bestoj forlasitaj en la lokoj. Tuj post la eksplodaj akcidentoj de la atomcentraloj en Fukuŝima pro la tertremego kaj cunamoj, ekagis ŝatantoj de hundoj kaj katoj en Jokohamo.

En la lokoj proksimaj al la atomcentraloj loĝis ne tiel multaj homoj, kaj do mortintoj kaj damaĝitaj domoj estis ne tiom multaj, kompare kun aliloke, sed la lokoj havis grandan damaĝon pro la eksplodoj de la atomcentraloj, kaŭze de la tertremo kaj cunamoj. La damaĝo de la atomcentraloj komenciĝis unu horon post la tertremo. Pro grandaj cunamoj la unua atomcentralo perdis la tutan elektrofonton, pro kio ne eblis malvarmigi kernajn reaktorojn. Matene de la sekva tago okazis plenfandiĝo.

Estis ege danĝere. Loĝantoj ĉirkaŭ la centraloj devis fuĝi foren, aliloken. Restis al ili nur mallonga tempo por prepari sin por fuĝi, kaj ili pensis, ke la fuĝado daŭros nur mallonge, kaj ke baldaŭ ili povos reveni hejmen. Ili do forlasis hundojn kaj katojn metinte manĝaĵojn kaj sufiĉan akvon. Sed poste dum longa tempo la loĝantoj ne povis eniri en la danĝerajn lokojn. Kio okazis al la forlasitaj hundoj kaj katoj?

Kvankam la posedintoj de la bestoj tre timis pri la sorto de la bestoj, ili nenion povis fari, ĉar vivi aliloke kiel senhejmuloj estis ja tre malfacile por ili.

En tia situacio ekstaris homoj bestamaj en Tokio, Jokohamo kaj aliaj. Ili komencis agadon por savi la vivojn de hundoj kaj katoj. Tuj post kiam grupanoj povis eniri en la lokojn, ili donis manĝaĵojn al bestoj, promenis ilin kaj faris diversajn helpojn. Ili fotis, kaj montris la fotojn en diversaj lokoj. Ili aranĝis ne nur fotojn sed ankaŭ poemojn verkitajn de poetoj kaj ankaŭ de ordinara homoj. La grupo en Jokohamo, kun 177 membroj lastjare, okazigis jam 38 ekspoziciojn de fotoj kaj poemoj en diversaj lokoj, ne nur en Jokohamo, sed ankaŭ en Kaŭasaki, Tokio kaj aliaj.

Suba foto montras la 38an ekspozicion de la grupo, kadre de la ekspozicio de diversaj grupoj en Kanagaŭa, en kiu ankaŭ nia Jokohama Esperanto-Rondo ekspoziciis Esperanton.



Jen estas unu el la poemoj.



Atendas

Arai Tomoji (Tomoĵi)

(membro de Klubo de Japanaj Poetoj)

*De la tago, kiam ho rompiĝis l' tero,
kaj eksplodis la central' atoma,
atendadis mi.
Anojn de la familio foririntajn
ĉiutage, ĉiutage atendadis mi
en la kliniĝinta domo,
ve-ronrone, plore miaŭ.
Ankaŭ en la sekva tago, en la posta tago,
en pli postaj*

*Leklekante mian korpon ĉiam pli
maldikiĝantan,
ĉiunokte aŭdis mi la voĉon en la vento.
Mi komprenis,
ke mi devas gardi ja ĉi tiun domon,
ĝis revenos la familianoj.*



VASILIJ EROŜENKO – JAPANA POETO (5)

Tatyana Auderskaya (Ukrainio), verkita en 2012

En 1923 Eroŝenko definitive forveturas al Rusio, kaj de tie – al 15-a UK en Nuerenberg (Germanio). Tie li denove trafas al atmosfero de streĉegita spirita vivo, al sia “spirita patrujo”.

Dum Internacia Poeta Konkurso Vasilij Eroŝenko ricevas la Unuan premion kun sia poemo “Aŭguro de ciganino”:

*Mia kara, mia bona,
Mia nobla belulin'!
Ciganino diros veron,
Ciganin' ne trompos vin.*

*Daŭra amo, daŭra ĝojo
Estas vana belesper':
En la mond' ŝanĝiĝas ĉio;
Ĉio pasas sur la ter'.*

*Sed memoru, ne forgesu,
Mia kara belulin',
Estas io en la mondo,
Kio ne perfidos vin.*

*Scias mi knabinajn revojn,
La sekretojn de la kor',
Scias mi pri homfeliĉo,
Scias mi pri amdolor'.*

*Pro l' amat', pro la amikoj
Venos plej malĝoja hor',
Kaj por ĉiam nur sopiro
Restos en la juna kor'.*

*Tio estas la ponardo,
Tio estas mortvenen'.
Kiam ĉio vin perfidos,
Ili estos vera ben'.*

*Kredas vi, ke la feliĉo
Estas via vera sort',
Kredas, ke belec' kaj amo
Akompanos vin ĝis mort'.*

*Mia kara, mia bona,
Vin kompatas ciganin'.
Plej fidataj vin perfidos,
Plej amataj trompos vin.*

*Vi memoru, ne forgesu,
Mia nobla belulin':
En la venĝ' ponard' vin
helpos,
Mortvenen' ne trompos vin.*

*Kredas vi, ke ne ŝanĝiĝos
Vera amo sub la sun',
Kredas vi, ke la amikoj
Ne perfidos sub la lun'.*

*Mia kara, mia bona,
Kompatinda belulin'!
Ciganino vin kompatas,
Sed ne povas helpi vin.*

*Mia kara, mia bona,
Mia nobla belulin'!
Ciganino diras veron,
Ciganin' ne trompos vin.*

*Kredas vi, sed mia kara,
Mia nobla belulin',
Kredu min, mi diras veron,
Ciganin' ne trompos vin.*

*Ne ekzistas ja sorĉado
Kontraŭ la fatala mort',
Ne ekzistas talismanoj
Kontraŭ malbenita sort'.*

Tiu premio estis “ne nur pro la poezio, sed pro lia tuta gloraga kaj profeta vivo”. (daŭrigota)